nia voĉo

madrida esperanto-liceo julio/aŭgusto 2014

## VIZITIS KAJ VIZITOS NIN

Ĵaŭde la 26-an de junio, vespere, okazis rendevuo de kelkaj madridaj esperantistoj kun veterana korea samideano sinjoro Urso, kiu vizitas Madridon. Ankaŭ partoprenis nia santandera amiko la verkisto kaj eldonisto Miguel Gutiérrez Adúriz.

Ankaŭ turismis en Madrido dum la fino de junio du britiaj samideanoj Tim Owen kaj Clare Hunter. Ili vizitis la sidejon de Hispana Esperanto-Federacio dimanĉe la 29-an matene, kaj renkontiĝis kun madridaj samideanoj.

Kiel ni jam informis, fine de julio troviĝos en Madrido nia japania samideanino Taeko Osioka, kiu dum la antaŭaj tagoj sekvas la Pilgriman Vojon de Sankta Jakobo. Ni nun organizas publikan prelegon pri ŝiaj spertoj kaj ŝia aktivado en la pacmovado en ŝia urbo Hiroŝimo. Plej probable la renkonto okazos la 21-an de julio en la sidejo de MEL, vespere, sed atentu la ĝeneralajn informejojn por koni la detalojn pri tiu interesa evento.

## ALIAJ KUNVENOJ KAJ BABILRONDOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL, plu okazas lunde vespere post la 18,30. Atentu: la 7an de julio plej probable la kunsido ne okazos. Ankaŭ dum aŭgusto la sidejo estos ĝenerale fermita, kaj oni ne antaŭvidas klubajn renkontojn.

La unuasabata ekstera renkonto okazos denove en julio en la parko de Retiro, la 5-an. Kiel en junio, ni rendevuos je la 5-a apud la statuo de Ricardo Codorniu, tre proksime al la Vitra Palaco (Palacio de Cristal).

## INFORMADO KAJ ENGAĜITAJ AGADOJ

Madrida Esperanto-Liceo, kunlabore kun HEF kaj SATeH, donacis kelkajn librojn al la Biblioteko de la Kvartalo San Fermín de Madrido. Temas pri popola biblioteko kaj socia projekto, kiu funkcias de antaŭ tridek jaroj por doni al la loĝantoj de la kvartalo la kulturan servon, kiun la madrida Urbestraro neas al ili. Tie okazis dulingva legado de poezio (hispana/ esperanto) far Miguel Fernández dum la tago de la libro la pasintan aprilon. La donacitaj libroj estis: vortaro "Amika", "Kurso de Esperanto" de M. Gutiérrez (kun KD), "Don Kiĥoto parolas Esperanton" kaj "Poezio, armilo ŝarĝita per futuro".

Laŭ informoj de SAT-en-Hispanio, sabaton la 14an Junio je 19.00 okazis prezento de la libro de Miguel Fernández "Poezio, armilo ŝargita per futuro" en la Librejo "La Libre del Barrio", situanta en strato Villaverde, 4, en Leganés. Partoprenis Pedro Sanz kaj la aŭtoro mem.

Dimanĉon la 15-an de junio, organizata de "Liberecana Asembleo de Karabanĉelo", okazis en "EKO" (memmastrumata socia centro situanta en okupata konstruaĵo ĉe la strato Ánade, 10 de Madrido) prelego/debato pri la lingvo esperanto, kun aparta emfazo al ĝia rilato kun la liberecana kaj laborista movadoj. Oni planas la postan starigon de lernogrupo, por kio estas bezonata la helpo de instruisto. Informoj en http://asamlibertariacarabanchel.wordpress.com/

Sabate la 28-an, je la 19:00 h., en la madrida parko "Martin Luther King" (apud la stratangulo inter la stratoj Arregui y Aruej, 31 kaj Nuevo Baztán) okazis literatura evento organizata de la asocio "Los pinos de Retiro", dum kiu estis legataj tekstoj kaj disdonataj premioj al gajnintoj de konkurso de rakontoj en kies ĵurio partoprenis Miguel Fernández, kiu ankaŭ legis kaj kantis diversajn poemojn el sia lasta libro "Poezio: armilo ŝargita per futuro".

Fine, daŭras la kunlaboro de SATeH kun la programo "La hora impía" de Radio Vallekas. La 22-an de junio oni festis la someran solsticon per deklamado de rakontoj kaj poezio, kaj per la kantado fare de Kvaropo Sinkopo.

## EKSPOZICIO DE PENTRARTO




Vendrede la 27-an de junio, estis inaŭgurita ekspozicio de pentrarto de nia samurbanino Ana Manero, en junulargastejo San Fermín, kie ĝi restos ĝis la 14-a de julio.

Dum la inaŭguro neplanite kunvenis dekduo da esperantistoj, inkluzive de kelkaj ne tiom ofte aperantaj inter ni.

## KONGRESOJ DUM SOMERO

La 10-a Eŭropa Esperanto-kongreso, organizata de Eŭropa E-Unuiĝo, okazos en kroata urbo Rijeka de la 6a ĝis la 12a de julio 2014. Pliaj informoj troveblas en la kongresa paĝaro ĉe: http://eeu-kongreso.webnode.com.

La 99-a Universala Kongreso de Esperanto disvolviĝos ĉijare en Bonaero, inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto. Ĝi estas organizata de la Argentina Esperanto-Ligo, kunlabore kun Universala Esperanto-Asocio, kaj ĝia oficiala retejo estas konsultebla en: http://www.esperanto.org.ar/uk2014/. Hispana Esperanto-Federacio partoprenos la Movadan Foiron kiu estas organizata por la komenco de la aranĝo.

Inter la 19-a kaj la 25-a de julio, alia hispanamerika urbo, Montevideo (Urugvajo) gastigos la jaran konferencon de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kiu esperas ricevi pli ol 100 instruistojn de tiu ĉi lingvo el la tuta mondo.

Preskaŭ samtempe celebriĝos la Internacia Junulara Kongreso en la brazila urbo Fortalezo, kun pli amuza programo, sed ankaŭ kun sociaj kaj kulturaj trajtoj kiuj igas ĝin vizitinda.

La Somera Esperanto-Studado, okazos en Nitra (Slovakio) kaj en Moskvo (Rusio). En la slovakia evento, kiu disvolviĝos inter la 12a kaj 20a de julio, speciala gasto estos nia samurbano Jorge Camacho. Vidu detalojn en http://ses.ikso.net/2014/sk/.

## RENKONTOJ EN KATALUNIO

La ĉijara Iberia Renkontiĝo, ĉiujare organizata de la junularaj asocioj de la duoninsulo, okazos en L'Arboç (Katalunio), la 5an, 6an kaj 7an de septembro. Aliĝiloj kaj informoj estas ĵus troveblaj en www.esperanto.cat/ir2014.

Inter la 4a kaj 11a de oktobro disvolviĝos la 22-a Internacia Semajno de Kulturo kaj Turismo, ĉijare en la urbo Salou.

## PLIAJ INFORMOJ

La venonta numero de "Nia Voĉo" estos eldonata fine de aŭgusto.

Dume, por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj kaj detaloj pri renkontoj kaj aliaj vizitu regule la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/, la retejon de MEL ĉe la adreso http://www.esperanto.es/mel aŭ la grupo en la socia retejo Fejsbuko (*Facebook*), https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

Feliĉan someron!

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com